**2025.2.1 Francio**
Kara HORI Jasuo, sanon kaj pacon al vi.
Jen mia respondo al Olga :

Estimata samideanino Olga.

Ekzistas diversaj tipoj de kapitalistoj. Iuj kredas, ke la "kuko" povas daŭre kreski kaj ke ĉiu povas akiri pli grandan parton de ĝi per interŝanĝoj kaj reguloj, dum aliaj konsideras, ke la "kuko" havas fizikajn limojn, kaj strebadas por kapti la kiel eble plej grandan parton de ĝi damaĝe al la aliaj. Tiu lasta tipo okazigis militojn interalie en Irako, Sirio, Ukrainio kaj DR Kongo pro iliaj subteraj riĉaĵoj ( nafto, gaso, raraj ercoj...).

Brit-usonanoj dum jaroj preparis militon kontraŭ Rusio pere de Ukrainio pro tiaj kialoj. La franca eks-prezidento *François HOLLANDE* kaj la germana ĉefministrino *Angela MERKEL* publike konfesis, ke la porpacaj intertraktatoj de Minsko estis nur trompo por akiri pli da tempo cele al plifortigo de la ukraina armeo, kaj la brita ĉefministro *Boris JOHNSON* persone intervenis en 2022 por ke Ukrainio ne subskribu intertraktaton porpacan kun Rusio. Tio estas ne rusa propagando sed historiaj faktoj !

Por ke popolamaso konsentu militon, propagandistoj nepre devas :

1) kaŝi la financajn kaj ekonomiajn interesojn ( ĉar neniu volas militi pro nafto aŭ ercoj ),

2) kaŝi aù misprezenti la historiajn faktojn ( ĉar necesas bone koni eventojn por prave taksi iliajn konsekvensojn )

3) estigi etoson de timo ( ĉar timo sekve estigas obeemon, perfortemon kaj malamikecon ),

4) interŝanĝi la rolojn de agresanto kaj agresito ( por ke agreso ŝajnu kiel pravigita sindefendo aŭ por ke sindefendo ŝajnu kiel agreso "sen provoko" ),

5) priskribi la malamikon kiel nehoman demonon ( ĉar malfacile al la plimulto estas

mortigi kaj suferigi homan fraton ).

Propagando regas ambaŭflanke, dum amaskomunikiloj en la manoj de kelkaj riĉegaj fi-kapitalistoj vaste diskonigas ĝin kaj silentigas kontraŭajn voĉojn en Okcidento ! Ni vekiĝu kaj pripensu atente...

Mi ne skribis, ke ne plu ekzistas kulturo en Ukrainio sed ke ĝi estas endanĝerigata pro estonta disdivido de la lando kaj de ĝiaj riĉajoj (kio estos la sekreta kerno de la venontaj porpacaj debatoj) kaj pro la malpliiĝo de enloĝantoj kun necesa enmigrado.

Aldono:
Kara Jasuo, jen aldono por mia reposnodo al Olga

*Margus Tsahkna* estas la ministro pri eksterlandaj aferoj de Estonio kaj en tiu artikolo en la angla lingvo konfirmas, ke la minoj de raraj ercoj espluateblaj en Ukrainio grave rolas en la nuna milito en tiu lando inter Rusio kaj Usono-NATO :

https://nationalinterest.org/feature/ukraine-critical-mineral-security/

Samideane via. D-ro Éric Bernard COFFINET

2025. 2. 1 フランス 親愛なる堀様、ご健康と平安をお祈り申し上げます。
オルガへの私の返答は次のとおりです。
親愛なる同志オルガ。
　資本家にはさまざまなタイプがあります。「パイ」は成長し続け、交換やルールを通じて誰もがより大きな分け前を得ることができると信じる人もいれば、「パイ」には物理的な限界があると考え、他人を犠牲にしてできるだけ多くのパイを獲得しようと努める人もいます。後者のタイプは、地下資源（石油、ガス、希少鉱石など）をめぐって、イラク、シリア、ウクライナ、コンゴ民主共和国などで戦争を引き起こしてきました。英国と米国は、このような理由から、何年もの間、ウクライナを通じてロシアとの戦争に備えてきました。元フランス大統領フランソワ・オランド氏と元ドイツ首相アンゲラ・メルケル氏は、ミンスク和平交渉はウクライナ軍強化のための時間稼ぎに過ぎなかったと公に認め、イギリス首相ボリス・ジョンソン氏は 2022 年にウクライナがロシアと和平条約に署名するのを阻止するために自ら介入しました。これはロシアのプロパガンダではなく歴史的事実です！ 大衆が戦争に同意するためには、プロパガ

ンダは次のことを行わなければならない。

1） 金融および経済上の利益を隠す（誰も石油や鉱物をめぐって戦争を起こしたくないため）、

2） 歴史的事実を隠蔽または歪曲する（その結果を正しく評価するためには出来事をよく知る必要があるため）

3） 恐怖の雰囲気を作り出す（恐怖はその後、服従、暴力、敵意を生み出すため）、

4） 侵略者と加害者の役割を入れ替える（侵略が正当な自己防衛のように見えるように、または自己防衛が「挑発なし」の侵略のように見えるようにする）、

5） 敵を非人間的な悪魔として描写する（ほとんどの人にとって、人間の兄弟を殺したり苦しめたりすることは難しいため）。どちらの側でもプロパガンダが君臨し、少数の裕福な縁故資本家が掌握するメディアがそれを広く流布し、西側諸国の反対意見を黙らせている。

目を覚ましてよく考えてみましょう... 私が書いたのは、ウクライナにはもはや文化がないということではなく、将来的な国とその資源の分裂（これが今後の和平議論の秘密の核心となるだろう）と、必要な移民による人口の減少によって文化が危険にさらされているということである。

追加： 親愛なる Jasuo、Olga への私の追加です エストニアの外務大臣マルグス・ツァクナ氏は、この英文記事の中で、ウクライナで採掘可能な希土類鉱物の鉱山が、同国におけるロシアと米国・NATO 間の現在の戦争において重要な役割を果たしていることを確認している。

**2025.1.31 Francio**

Kara Jasuo,

Cxu vi ekscis, ke Poutine diris la 19an de januaro 2025, ke li intencas paroli pri paco en Ukraino kondicxe ke li **ne parolus kun Zelenski mem**?

Cxu tio ne estas pruvo de konfeso, **konfeso de lia persona malamego** de Zelenski mem? Kaj pro tiu malamego li militis kontraux tuta ukraina popolo murdante lin de dekmiloj kaj dekmiloj da homoj! Kaj samtempe mortigis dekmiloj kaj dekmiloj da rusoj! Tio estas pura sensensajxo sen io ajn pravigileco. Honto al tiu homo kiu ne mem meritas tiun nomon de homo! **Poutine estas la honto de la homaro.**..

Dankon pro viaj elsendoj de "Vocxoj de la mondo". Kontrauxe al Poutine, vi batalas por la gloro de la homaro! Gratulojn.

Plej amike.

Francis Desmares

2025. 1. 31 フランス

親愛なるヤスオ様 プーチン大統領が 2025 年 1 月 19 日に、ゼレンスキー大統領と直接話をしないという条件でウクライナの平和について話し合うつもりだと述べたことをご存知ですか? これは自白の証拠ではないのか？ゼレンスキー氏自身に対する個人的な憎悪の告白ではないのか？そしてその憎しみのせいで、彼はウクライナ国民全体に対して戦争を起こし、何万人もの人々を殺害したのです！そして同時に何万人ものロシア人を殺害したのです！それは何の根拠もない全くのナンセンスです。人間という名に値しないその男は恥を知れ！プーチンは人類の恥だ. . .

「世界の声」放送ありがとうございました。プーチンとは違い、あなたは人類の栄光のために戦っているのです！おめでとう。 親愛なるフランシス・デスマレス

**2025.2.2 Ĉeĥio**

Saluton sinjoro Jasuo.

Atakoj al ukrainaj urboj dauras.

1.02 En Poltava bombo detruis multetag^an log^domon. 7 homojn mortis, 17 estas vunditaj (inter ili 4 infanojn), ankorau 22 oni savis de ruinoj ne vunditaj.

Raketoj "Iskander" detrius malnovan centron de Odeso. Estas difektitaj filarmonio, 4 muzeoj, historiaj domoj, kaj hotelo, en kiu estis kelkaj norvegaj diplomatoj. Inter ili estas vunditaj. Milito neniam estas justa, kaj ofte decidoj, kiuj faras politikistoj, kostas tre multe dá sufero kaj sango pór ordinaraj homoj. Kaj post fino de milito estas ege malfacile devigi agresanton respondeci pri cio farita. Olga

2025. 2. 2 チェコ共和国

こんにちは、泰雄さん。

ウクライナの都市への攻撃は続いている。

1. 02 ポルタヴァでは爆弾により高層アパートが破壊された。7 人が死亡、17 人が負傷（うち子供 4 人)、22 人が無事に瓦礫の中から救出された。「イスカンデル」ミサイルはオデッサの旧市街を破壊するだろう。フィルハーモニー管弦楽団、博物館 4 棟、歴史的建造物、ノルウェーの外交官数名が滞在していたホテルが被害を受けた。その中には負傷者もいる。戦争は決して正義ではなく、政治家の決定によって一般の人々が多大な苦しみと流血を経験することがよくあります。そして戦争が終わった後、侵略者にその行為すべてに対する責任を負わせるのは極めて困難です。オルガ

**2025.2.1 DR Kongo**

Saluton kara Jasuo.

Ion mi forgesis mencii, mi, mi ne venas el Goma sed el Bukavu (ĉefprovinco, ĉefloko de la provinco sud-kivu).

Tiuj, kiuj nun travivas tiun tragedion de milito estas niaj karaj Honoré sebuhoro, Joel Muhire, kaj aliaj, kiuj venas el Goma.

Do, se mi diris, ke miaj familianoj, gefratoj mortis, tio signifas, el niaj amikoj jam mortis ties familianoj. Kara Honoré perdis siajn nepojn kaj alian.

Dankon,　Malekera

2025.2.1 コンゴ民主共和国 こんにちは、ヤスオさん。

言い忘れていましたが、私はゴマ出身ではなく、ブカブ（南キブ州の州都）出身です。今、この戦争の悲劇を経験しているのは、私たちの愛するオノレ・セブホロ、ジョエル・ムヒレ、そしてゴマ出身の人々です。ですから、私の家族、兄弟が亡くなったと言うなら、それは私たちの友人の家族もすでに亡くなっているということになります。親愛なるオノレさんは孫たちともう一人の家族を失いました。

ありがとう、マレケラ

**2025.2.1 Belgio**

Bonan matenon el belgio, sinjoro Hori.

Mi legis viajn Vocxojn el la mondo kaj mi pensis pri miaj geamikoj, kiuj estas nun en Goma en Kongo. Ili sendis al mi mesagxojn pri mia fejsbuka pagxo merkredon, jxauxdon kaj vendredon. La situacio tie estas nun terura.

Mi volus helpi ilin sed kiel simpla civitanino, mi ne scias kiel.

Ili sendis al mi videojn. Kaj mi metis ilin sur mia fejsbuka pagxo (viviane tis). Mi esperas ke tio helpos iomete ilin.

sMi legis hodiaux ke la francio demandis al Kagame eliri el Kongo. Sed Kagame respondis ne.

Por Ukraino, oni parolas nun malpli pro la situacio en Kongo, mi suspektas ke tie ankaux, la situatio estas terura.

Kaj estas ankaux Sirio, kie la turkoj bombardas la kurdojn el la Rojava (nordo de la sirio).

Kaj ankaux israelo kiu bombardas cxiujn siajn najbarojn, sen neniaj hontoj.

Mi pensas ke nia besta speco havas gravajn problemojn. Amike, Viviane

2025.2.1 ベルギー ベルギーからおはようございます、堀さん。

あなたの「世界からの声」を読んで、私は今コンゴのゴマにいる友人たちのことを考えました。彼らは水曜日、木曜日、金曜日に私の Facebook ページに関するメッセージを送信しました。現状はひどいです。 私は彼らを助けたいのですが、一市民として、どうすればよいか分かりません。 彼らは私にビデオを送ってくれました。そして、私はそれらを自分の Facebook ページ (viviane tis) に載せました。これが少しでも彼らの助けになれば幸いです。フランスがカガメにコンゴから撤退するよう要請したと今日読みましだ。しかしカガメはノーと言いました。

ウクライナに関しては、コンゴの状況のせいで今は報道が減っていますが、そこの状況もひどいのではないかと思います。そしてシリアもあり、そこではトルコがロジャヴァ（シリア北部）のクルド人を爆撃しています。そして、イスラエルは、何の恥も感じることなく、近隣諸国を爆撃している。私たちの動物種は深刻な問題を抱えていると思います。ヴィヴィアン


**2025.2.7 DR Kongo**

Sinceran saluton miaj karaj amikoj   el amilia sumoisto,
Mi ankoraŭ trovas ĉi tiun ŝancon sendi al vi ĉi tiun etan raporton por januaro 2025.
Komprenu min, ĉar ĉi tie ni trapasas koŝmaran situacion.   Mi ne forgesos sciigi vin, ke mi perdis mian patran onklon dum la milito inter la ribeluloj de M23 kaj la konga armeo en la civito Minova/Suda-Kivu lastan fojon.

Mi ne forgesos rememorigi vin pri la reunuiĝo de miaj edzino kaj filino, kiuj estis mizere en la urbo Goma dum   perfortaj kolizioj la 20-an de januaro 2025.
Bedaŭrinde, ĉiuj hejmaj bezonaĵoj, ne forgesante la tajlormaterialojn, estis prirabitaj de la banditoj dum la fuĝo.
Ni komprenu ĉion ĉi, jen homa vivo!
Mi ĝojas, ke miaj edzino kaj filino eskapis ĉi tiun malbonan venton!
Elkore al vi Honoré Sebuhoro.

2025.2.7 コンゴ民主共和国 友人の皆さん、心からのご挨拶を申し上げます。
2025 年 1 月のこの小さなレポートをお送りする機会がまだあると思います。 私の言っていることを理解してください。私たちは今、悪夢のような状況を経験しているのですから。 前回、ミノバ市/南キブ州で起きた M23 反乱軍とコンゴ軍との戦争で、私の父方の叔父が亡くなったことをお知らせします。 2025 年 1 月 20 日の激しい衝突の際にゴマ市で惨めな思いをしていた私の妻と娘との再会を、私は皆さんに思い出させることを忘れないでしょう。残念なことに、逃走中に盗賊団によって、仕立ての材料はもちろ

ん、生活必需品がすべて略奪されてしまいました。これが人間の人生です！ 妻と娘がこの強風から逃れられてよかったです！ オノレ・セブホロより愛を込めて。




**RAPORTO POR LA JANUARA MONATO 2025 EN RUTSHURU NORDA-KIVU EN DEMOKRATA RESPUBLIKO-KONGOLANDO**

## I. ENKONDUKO

Karaj gesamideanoj en Esperantio,

La nuna situacio, kion nia lando DRK travivas ĝuste en la tuta Oriento (Norda kaj Suda Kivuo sen forgesi Ituri) alvokas nin kiel agantoj de la eduka sektoro por garantii, kiel eble plej, la daurigecon de lernejaj agadoj kaj lernado de nia lingvo Esperanto malgraŭ multnombraj sekurecaj defioj Orientparte. La edukado de nia lingvo pri unuiĝo, pacigo sen diskriminacie restas fundamenta kolono por internacia rezistemo kaj ŝlosila faktoro de sociekonomia evoluo. Ĝi ludas gravan esencan rolon por havigi al junaj generacioj la sciojn kaj kapablojn necesajn por konstrui stabilan estontecon kaj kontribui kiel engaĝitaj civitanoj, al la firmiĝo de paco, nacia, internacia unueco kaj finfine kolektiva progreso.

Malgraŭ la malfacilaĵoj renkontitaj dum preskaŭ kvar jaroj, nia lukto por propagandi nian lingvon pri la paco devas okaziĝi. Nia kuraĝo neniam ĉesiĝu disvastigi nian lingvon, kiu fariĝis ponto de paciĝo kaj unuiĝo ne rompas. Kio estas tie, necesas, ke ni plifortigu niajn proprajn klopodojn por konsciigi ĉiujn intelektajn junulojn por serioze lerni utilajn principojn de nia iniciatinto de Esperanto, Doktoro pri Esperanto Ludoviko Lazaro Zamenhof. Tiu ĉi utila homo de la homaro, travivis tiajn severajn kondiĉojn dum sia vivo ekde sia starigo de Esperanto-movado.

## II.STATO DE SAMLOKAJ KLUBOJ

### II.A. VERDA STELANO-KLUBO

❖ **Lernado kaj evoluo de la lingvo:**

- Nia Verda Stelano-Klubo, komencantoj progresas en Esperanto-kurso. Ili estas en la sesa leciono de la 22-leciona programo de instruisto Hubert FEREZ.
- La membroj de VSK kunvenis la 23-an de Januaro 2025 por memtaksi iujn agadojn faritajn dum la pasinta jaro.
- Superrigardo de junaj volontuloj lerni Esperanton en kvar horoj.

- Familia vizito al nia amiko, kiu perdis sian gepatron.

## II.B. ĈIAM ANTAŬEN

- Ĉi tiu teamo de infanoj faris du sesiojn de lernado de Esperanto sed por ĉi tiu monato de februaro estas paŭzo ĉar ili estas en la ekzamenperiodo en la malsamaj lernejoj kie ili lernas la normalan kurson. Ni ne volis konfuzi ilin, ĉar ili ankaŭ studis por trapasi siajn unuajn semestrajn ekzamenojn.

## II.C. BUZITO/NJILI INSTITUTO

- Pri tiu ĉi Buzito/Njili mezlernejo Esperanto-kurso bone progresas kiel kutime en ĉiuj ses klasoj. Por ĉi tiu periodo de la unua semestro, tiuj studentoj ankaŭ faris Esperanto-ekzamenon. Ĝi estas sorĉa ĉar preskaŭ ĉiuj sukcese trapasis la ekzamenon.
- Restas Esperanto-ekzameno por la dua semestro ĉirkaŭ junio 2025. Ni deziras al ili bonan sukceson en nia lingvo.

## III. KONKLUDO

**Plendo al vi legantoj:**

- Sekve de la tre pliigita vundebleco por tiu ĉi Buzito-mezlernejo kaŭzita per tiu ĉi milito, la gepatroj malriĉiĝis senlabore kaj senprofita laboro. La studentoj mankas klasojn kaj eĉ skribotablojn (pupitroj) por sidiĝi. La konstruaĵo estas strange nebone konstruita kaj mankas je daŭrigebleco. Se vi analizas kaj observas ĝin, vi vidos, ke ĝi ne estas lernejo, kiu respektas normalan viveblecon, ne sufiĉajn latrinojn por ĉi tiuj ses klasoj.
- Fakte, higienaj kondiĉoj por virinoj preskaŭ ne ekzistas pro la manko de rimedoj por konstrui sufiĉe da necesejoj. Imagu, ke knaboj kaj knabinoj uzas la saman latrinon, ne logike.
- Nia deziro estas peti **« de Esperantistoj de bona kredo, kun kompatinda koro »** doni financhelpon al tiuj ĉi studentoj konstruante bonan vivedeblecan lernejon. Per tiu ĉi monhelpo eblos konstrui almenaŭ 6 estrarklasĉambrojn kaj 6 latrinojn se eblas. Kun plankoj ĝi ne povus postuli multon kiel en daŭraj materialoj.

**PS.** Nia deziro estis tute simple starigi **fortan punkton de E-o** en nia Teritorio de Rutshuru kiu povus marki la mondon de Esperanto Afrike kiel la Zamenhofa lernejo situanta en Togolando. ***Al niaj legantoj, ĉu vi ŝatus havi ĉi tiun volon kaj bonan kredon por helpi ĉi tiun lernejon konstrui ĉi tiujn 6 klasojn inkluzive de latrinoj sen forgesi bibliotekan ĉambron?***

Ĉi tiuj ripetaj militoj en Norda-Kivuo bremsis nian evoluon. Kaj ni pensas, ke vi mem observas tion per televide, novaĵgazetoj, internaciaj radiostacioj: *www.rfi.fr,*

*[www.7sur7.cd](http://www.7sur7.cd), [www.radiookapi.net](http://www.radiookapi.net), ktp.*

Farite en Rutshuru, la **1-an de Februaro 2025.**

*Kursgvidanto Honoré Sebuhoro (honsebn@gmail.com)*

**Aneksaĵo**

***Vundeblaj klasoj el mezlernejo Buzito/Njili kiuj ne respektas la kondiĉojn.***

**2025.2.8 Ĉeĥio**

Sluton sinjoro Jasuo.

Tempo al tempo mi spektas diversajn sportajn elsendojn kaj en ili mi vidas ukrainajn sportistojn. Atletojn, biatlonistojn, skejtistojn, futbalistojn, boksistojn, kaj aliaj. Ne ĉiam ili estas sukcesaj, sed ili elkore batalas kaj donas al sia sporto ĉion. Malgrau malfacilaj^oj kun trejnado, kaj financado de teamoj ili strebas montri rezulton. En ĉiu batalo necesas resti fortaj.

Dum rusa atako al Poltava mortis 14 homoj, kiuj apartenas al sama familio.

Francio aldonas al Ukrajino rapid'aviadilojn "Miraj^", Holandio aviadilojn F-16.

Ĉehio daurigas vizojn pór fug^intojn je duonjaro.

En Slovakio kontrau FICO protestas en 30 slovakaj urboj, kaj eĉ eksterlande slovakoj venis al protestojn (multaj slovakoj laboras au studas en najbaraj landoj). En Bratislavo al pacaj protestoj venis pli ol 32000 homoj, ili postulas ke FiCO finig^u en sia funkcio. Oni konsideras lin kiel perfidulon de sia patrujo. Olga

2025.2.8 チェコ共和国

私は時々さまざまなスポーツ中継を見ていて、その中でウクライナの選手を見かけます。アスリート、バイアスロン選手、スケーター、サッカー選手、ボクサーなど。彼らはいつも成功するわけではありませんが、全身全霊で戦い、スポーツに全力を尽くします。チームのトレーニングや資金調達の困難にもかかわらず、彼らは成果を出すために努力しています。あらゆる戦いにおいて、強さを保つことが必要です。

ロシア軍によるポルタヴァ攻撃中に、同じ家族に属する14人が死亡しました。

フランスはウクライナに「ミラクルズ」高速ジェット機を追加し、オランダはF-16ジェット機を追加しています。

チェコ共和国は難民のビザを6か月延長します。

スロバキアでは、30のスロバキアの都市で大統領FICOに対する抗議活動が行われており、国外のスロバキア人も抗議活動に参加している（多くのスロバキア人は近隣諸国で働いたり勉強したりしている）。ブラティスラバでは3万2000人以上が平和的な抗議活動に参加し、FiCOの業務停止を要求しました。彼は祖国に対する裏切り者とみなされています。オルガ

**2025.2.8 DR Kongo**

Mesaĝo de kondolenco al la familio kaj Esperanto-movado de nia fama Esperantisto S-ro Profesoro Renato Corsetti!

Mi, mia familio kaj ankaŭ membroj de Verda Stelano-Klubo el Rutshuru teritorio, Norda-Kivuo en Demokratia Respubliko - Kongolando, tre bedaŭras ekscii pri via perdo same kiel la Esperanto-movado. Niaj pensoj estu kun vi dum ĉi tiu malfacila tempo, kiun vi travivis. Ni havas nenion sur ni ĉar homaj cirkonstancoj estas multnombraj! Ni restu ĉiam unuiĝintaj! La animo de nia esperantista kamarado kaj Instruisto Renato Corsetti ripozu pace en la lando de niaj prapatroj!

Nome de Verda Stelano-Klubo

S-ro Honoré Sebuhoro, kursgvidanto.

2025.2.8 コンゴ民主共和国

著名なエスペランティスト、レナート・コルセッティ教授のご家族とエスペラント運動に哀悼の意を表します。 私と私の家族、そしてコンゴ民主共和国北キブ州ルチュル地域のグリーンスタークラブのメンバーは、エスペラント運動と同様に、あなたのご逝去を大変残念に思っています。 あなたが経験してきたこの困難な時期に、私たちはあなたと共にあることを祈っています。 人間の事情は数え切れないほどあるので、私たちには何もありません。 いつも団結し続けましょう！ 私たちのエスペランティスト同志であり教師であったレナート・コルセッティの魂が、私たちの祖先の地で安らかに眠りますように。

グリーンスタークラブを代表して コースリーダーのオノレ・セブホロ

。

**2025.2.9 DR Kongo**

Dankon kara Hori pro via rapida respondo !

Fakte,ĉio kio enhavas komencon, ĉiam enhavas finon.

Sed komprenu la perdanta, estas ni la popoloj.

Ekzemple, dum tiu milito:

- Mia patra onklo forpasis
- Mia fratino Melissa pafita nivele de siaj gamboj (kruroj)
- Niaj domo-aĵoj, kaj ĉiuj 6 stebmaŝinoj kun ĝiaj akcesoraĵoj ŝtelitaj.

Kiel vivigi, edukigi, niajn kvin geinfanojn?

Ni estas en tre malfacila vivo nun !

Amike Honoré

2025.2.9 コンゴ民主共和国

堀さん、早速のご返信ありがとうございます！ 実際、始まりがあるものは必ず終わりがあります。しかし、敗者は私たち国民だということを理解してください。たとえば、この戦争中は: – 私の父方の叔父が亡くなりました。 – 妹のメリッサは足を撃たれました – 家庭用品と付属品付きのミシン 6 台すべてが盗まれました。5 人の子どもをどうやって育て、教育すればいいのでしょうか? 私たちは今、とても困難な生活を送っています。 親愛なるオノレ